UN prezentos pli ol 400 librojn dum la internacia librofoiro.

La sistemo de UN en Kubo prezentos la librojn en cifereca formato dum la internacia librofoiro 2014 kiu ekos la 13-an februaro en Havano kaj da?ros ?is la 23-a en la fortreso Sankta Karlo de La Cabaña.
La libroj estos je dispono de la publiko ?eestonta la pavilonon de UN kaj oni povus ilin kopii en memorbastonoj a? aliaj iloj, servo donota senpage.
?i-foje, la stando de UN estos trovebla je malmultaj metroj de la infana areo *Papertrezoro*, la? diskonigita informo.
La iniciaton bonvenigis pasintjare miloj da vizitantoj, nome universitataj studentoj, esploristoj, akademiuloj kaj bibliotekoj, kiuj kolektis aktualigitan datumaron pri nutra sekureco, familia agrikulturo,energio, klimata ?an?i?o, internacia kunlaboro, medio, sciencoj,sano, perforto, ?enro, kulturo kaj edukado.
De anta? pli ol 15 jaroj, la sistemo de UN partoprenas en la librofoiro, kiun ?i taksas inter la plej gravaj kaj partoprenigaj eventoj de la kuba kulturo.

http://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/14244-un-prezentos-pli-ol-400-librojn-dum-la-internacia-librofoiro

Radio Habana Cuba